Nekonataj reloj ĉirkaŭ Triesto

La itinero, projektita ekde majo 1992, atingas la plej orientan fervoj-stacidomon de la Itala reto kaj sur reloj ne plu utiligitaj por pasaĝera trafiko, sed reaktivigataj alcele, laŭiras liniojn kiuj de la maro kondukas al Karsto, entuneliĝante en la urbajn fundamentojn, por poste abrupte kvazaŭ tuŝi ruĝajn tegmentojn kaj kultivitajn legomĝardenojn. Laŭ la malnovaj trakoj de la Aŭstraj Fervojoj inter stacidomoj de antikva arkitekturo, oni travagadas sorĉe ravajn panoramojn, elstarigante la kontraston inter la kruda beleco de la karsta naturo kaj la milda bluo de la vasta golfo: ĉio ĉi elvokas en la koroj mirajn sentojn antaŭ tiu naturaj spektakloj.



Stacidomo *Campo Marzio*

Oni ĝuas kelkajn momentojn for de la kutima ĉiutaga rutino, por admiri, je la reveno, la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn el nekonata perspektivo, komforte sidante en iu kupeo de la du legendaj elektraj motor-vagonoj: ALe 790.037 kaj ALe 880.073 aŭ en la Historia Trajno, konsistanta el tri, teknike unikaj, vagonoj, trenataj de la lokomotivo E. 626.238.

La trajno vin gvidos laŭ la malnova Suda fervojlinio (*Ferrovia Meridionale*) kaj la Transalpa (*Transalpina*), kun la celo malkaŝi nekonatajn lokojn kaj historion en tiu ĉi teritorio. Oni haltos ĉe la antikvaj stacidomoj de *Rozzol*, *Guardiella*, *Opicina*, *Prosecco*, *Aurisina*, *Grignano* kaj *Miramare*. La panoramoj regalos vin per intense emociaj momentoj, kaj vi surpriziĝos pro la grandanimeco de la naturo kiu larĝmane donacis al la homo tiom da mirindaĵoj